# *La aktualiga ekonomia procezo devas esence kreski el la fundamentoj.*




Danilo Guzmán, prezidanto de la asocio de ekonomistoj de Kubo (ANEC) asertis ?i-semajne ke la aktualigo de la kuba ekonomia modelo malfermas novan etapon decidotan en ?iu loko, entrepreno, kooperativo, merkato kaj laborejoj.
Tiusence li  emfazis ke la asocio de ekonomistoj celas ke en siaj bazaj agadoj ili devas roli kiel pu?ilo kontribuonta al konkero de efika entrepreno kiu nepras por kiu ajn ekonomio.
Kadre de ceremonio pro la 35-a fondodatreveno de tiu asocio, okazinta en la memorialo al José Martí en Havano, li emfazis ke la ekonomistoj kaj librotenistoj transiris diversajn etapojn kiuj ne devas esti apartigitaj de la ellernado.
Li anka? emfazis pri la rolo de Ernesto Che Guevara por la kubaj ekonomistoj kaj pro tio la asocio estis fondita la 14-an de junio, okaze de la naski?dateveno de tiu elstara figuro kiu heredigis gravajn dokumentojn en la fako de ekonomio.
Li esprimis sian sintenon pri la subjektivaj kondi?oj hodia? kreitaj por ke la kuba ekonomio, en vera formo-fasko de proprieto kaj mastrumado, kaj kun aktiva, demokratia kaj fleksebla partopreno de la diversaj ekonomiaj subjektoj, forlasu internajn balastojn kaj eksterajn kiuj malhelpas evoluon kaj tiel transiru al supera stadio de efikeco kaj efektiveco prospero-plena.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/economia/25275-la-aktualiga-ekonomia-procezo-devas-esence-kreski-el-la-fundamentoj

**Radio Habana Cuba**